

Mesaĝo okaze de la Internacia Virina Tago, 8 marto 2017

Internacia Virina Tago estas okazo por pripensi la progreson faritan survoje al forigo de diskriminacio kontraŭ virinoj kaj insistado pri iliaj egalaj rajtoj, kaj ankaŭ por konsideri la longan vojaĝon al egaleco kiu ankoraŭ irendas.

Universala Esperanto-Asocio aparte zorgas pri la efikoj de edukaj kaj sociaj malegalecoj sur la vivoj de knabinoj kaj virinoj. Al grandaj nombroj tra la mondo oni baras aliron al edukado samnivela kiel tiu de iliaj fratoj, kaj la proporcio de analfabetaj virinoj estas pli alta ol tiu de viroj. Tiuj kondiĉoj estas proksime ligitaj al pli limigita aliro al la lingvoj de pli vasta komunikado kaj politika partopreno, kaj tial al malpli da influo en la familia kaj socia decidfarado.

Kaj la progreso ne estas egala: en iuj mondopartoj, la kondiĉo de virinoj eĉ plimalboniĝas.

Samtempe, UEA agnoskas kaj estimas la gvidan rolon de virinoj en movadoj por lingva kaj kultura revigligo, kaj pro la protektado de “la doma vivo de la popoloj” de diversaj formoj de subpremo kaj diskriminacio. Tiaj klopodoj estas esenca parto de la strebado por konstrui mondon en kiu multaj lingvoj kaj kulturoj povas konekzisti harmonie. La protektado kaj antaŭenigo de la rajtoj de virinoj estas nemalhavebla dimensio de ĉi tiu strebado.

En ĉi tiu Internacia Virina Tago, ni esprimas nian solidarecon kun movadoj por forigi diskriminacion kontraŭ virinoj kaj knabinoj, kaj por konstrui daŭripovan estontecon en kiu ĉiuj homoj estas traktataj kun egalaj zorgo kaj respekto, senkonsidere pri lingvo, kulturo, genro, kaj aliaj formoj de diverseco.

MESSAGE ON THE OCCASION OF INTERNATIONAL WOMEN'S DAY, 8 March 2017

International Women's Day is an occasion both to reflect on the progress made towards the removal of discrimination against women and the assertion of their equal rights, and also to consider the long journey towards equality that remains to be made.

The Universal Esperanto Association is particularly concerned with the educational and social disparities affecting girls and women. Large numbers across the world are denied access to education on a par with their brothers, and the proportion of illiterate women in the world is greater than that of men. These conditions go hand in hand with more limited access to languages of wider communication and political participation, and hence with less influence in familial and social decision-making.

Nor is progress uniform: in some parts of the world, the condition of women is even worsening.

At the same time, the UEA recognizes and honours the leading role women play in movements for linguistic and cultural revitalization, and for the protection of the domestic sphere from various forms of oppression and discrimination. Such efforts are an essential part of the struggle to establish a world where many cultures and languages can coexist in harmony. The protection and advancement of the rights of women are a vital dimension of this struggle.

On this International Women's Day, we express our solidarity with movements to end discrimination against women and girls, and to build a sustainable future in which all people are treated with equal care and respect, irrespective of language, culture, gender, and other forms of diversity.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041